*Lian domon pasante, per unu okulo*
*Mi ekvidis panteron kun guf' por kunulo.*
*La pantero englutis ja ĉion gluteblan,*
*Al la gufo lasante nenion manĝeblan.*
*La festeno finiĝis : al la guf' li permesis*
*La kuleron empoŝi ; li mem ne forgesis*
*La tranĉilon enpaki virinan en mufon*
*Kaj per tio li ankaŭ distranĉis la —— !*

En tiu momento la Falsa Kelonio malpacience interrompis ŝin :—

" Por kio utilas " li diris " ke vi eldiru tiajn versaĉojn, ne dume klarigante ilin ? Ĝi estas ja la plej konfuziga lingvaĵo kiun iam en la vivo mi aŭskultis."

" Jes " konsente diris la Grifo " ankaŭ mi opinias ke estos bone ne plu daŭrigi tiun deklamaĵon." Ankaŭ Alicio tre ĝoje konsentis.

" Ĉu vi volas ke ni tradancu la duan parton de la Omara Danco ? " proponis la Grifo " aŭ ĉu vi eble preferus ke la Falsa Kelonio kantu al vi ? "

" Ho, mi certe preferus la kanton, se la Falsa Kelonio komplezos." Alicio respondis tiel fervore ke la Grifo diris, ofendite :

" H'm ! Pri gustoj ne utilas diskuti." " Do, se agrable al vi, karulo, vi kantu por ŝi ' *Kelonia Supo.*' "

La Falsa Kelonio ekĝemis profunde, kaj kantis per voĉo iafoje plorsufokita :



*Supo alloga de verda kolor'*
*Preta je la sepa hor' !*
*De la vespero la ĉefa glor' !*
*Supo vespera, bela vi Sup' !*
*Supo vespera, bela vi Sup' !*
*Su-upo ve-espera, Su-upo ve-espera*
*Bela, ho bela vi Sup' !*

*Ho, bela Supo ! pli bona ol truf',*
*Ol supo el bovida huf' !*
*Ĉion fordonus mi por suf—*
*—iĉe da vi, ho bela vi Sup' !*
*—iĉe da vi, ho, bela vi Sup' !*
*Su-upo ve-espera, Su-upo ve-espera !*
*Bela, ho bela vi Sup' !*
*—VI SUP' !*

" Denove la horon " ekkriis la Grifo. Sed kiam la Falsa Kelonio nur komencis rekanti ĝin, de iu malproksima loko aŭdiĝis laŭta ekkrio :—

" *La proceso komenciĝas !* "

" Vi rapidu do " kriis la Grifo al Alicio, kaj preninte ŝin per la mano, ĝi rapidis for, ne atendante la finon de la ĥoro.

Pri—kio—oni—pro—cesas ? " Alicio dum la kurado demandis spiregante ; sed la Grifo nur kuris pli rapide. Dume sekvis ilin—pli kaj pli mallaŭte—la voĉo de la Falsa Kelonio finanta per tre melankoliaj tonoj la rekantaĵon :

*Su-upo ve-espera ! Supo ve-espera !*
*Bela, ho bela vi Sup' !*

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo